IPR

Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031
Jarkolekto 53 - trimonata
2023/1

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:
József Németh (red.)
Mireille Grosjean
Luigia Oberrauch Madella
Ahmad Reza Mamduhi
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:
Cosetta Bernardi
Renato Corsetti
Mireille Grosjean
Didier Janot
Ilona Koutny
Isikawa Tieko
Katalin Kováts
Aranka Laslo
Alessandra Madella
Ahmad Reza Mamduhi
Zdravka Metz
Judith Meyer
Jozefo Németh
Luigia Oberrauch
Radojica Petrovič
Hamzeh Shafiee
Yu Jianchao



Mireille Grosjean, la nova Honora Membro de ILEI **(vd. p. 18)**

ilei

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) 3
Ilona KOUTNY: *Novaj magistraj studoj […]* 4
Enkonduko de la novelo „Antimilitisto" de Lusin (Yu Jianchao)..... 7
La eduksistemo en Kebekio (Luigia OBERRAUCH, Zdravka METZ) 9
Pri la laborplano de ILEI (Renato CORSETTI) 14
Biografio de Mireille Grosjean, la nova Honora Membro de ILEI 18
E-o kaj la angla en la 8-a Internacia Konferenco de AALA (A. MADELLA)..... 19
Kiel prepariĝi por KER-ekzameno (Judith MEYER, Katalin KOVÁTS)..... 22
Instruisto havas la eblon decidi pri la enhavo de multaj ekzercoj (GROSJEAN) 26
Kiel agadi kun UNESKO? (Didier JANOT)..... 27
El la landoj kaj sekcioj (DE, JP, IT, RS)..... 29
Nova membro-administranto de ILEI (Ahmad R. MAMDUHI, Hamzeh SHAFIEE).. 34
Informoj pri ILEI, adresaro de sekcioj, reprezentantoj, kontaktpersonoj 35

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Ahmad Reza MAMDUHI, Nr. 9, K. Iraj, Kh. Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-Afshar, Kh.Vahid Dastgerdi, Tehran-1916613514, Irano. Tel. +98 9122115419 (Telegram, WhatsApp). <*mamduhi@gmail.com*>. Universitata agado, ekstera komunikado kaj varbado, observanto kaj komitatano A ĉe UEA.

Sekretario: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. +7 919-670-25-34. <*lena_espero@mail.ru*>. Lerneja agado.

Estrarano pri financoj: Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio. *ilei.kasisto@gmail.com* (financoj). Tel.+374 55 279906 (Viber, WhatsApp), <*karinko_arm@mail.ru*>. Ekzamenoj.

Vic-prezidanto: Alessandra MADELLA, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, Italio, Tel. +39 0521 785582, <*a.madella@tiscali.it*>. Lerneja, universitata, scienca, landa kaj regiona agadoj (Orienta Azio), ekstera komunikado kaj varbado.

Estrarano pri kongresoj: Laura BRAZZABENI, via San Filippo 52, IT-58031 Arcidosso (GR), Italio. <*laura.brazzabeni@gmail.com*>. Tel. +39 3286461063 (WhatsApp). Lerneja agado.

Estrarano: Marija JERKOVIĆ, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. +385 981771741. <*mjerkovic@net.hr*>. Lerneja kaj landa agadoj.

Estrarano: Fernando PITA, Estr. Cel. Vieira 134, bl 3, ap 402; Irajá; Rio-de-Ĵanejro cep 21220-310, Brazilo. <*magisterpita@gmail.com*>. Tel. +55 21 98863-3854 (Telegram,WhatsApp). IPR, universitata kaj scienca agadoj, observanto ĉe TEJO.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <*radojica.petrovic.rs@gmail.com*>. Tel. +381 64 8525321 (Viber, WhatsApp, Telegram). Eduk-projektoj, universitata agado, instrukapabligado.

Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford; AdE[1]
***Membroj*:**
Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah
Renato Corsetti, Britio/Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza"; AdE[1]
Probal Dasgupta, Barato, emerita profesoro de LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE[1]
Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas
Boris Kolker, Usono; AdE[1]
Ilona Koutny, Pollando/ Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu
Stefan MacGill, Nov-Zelando/ Hungario
Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения, AdE[1]
Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu
Balázs Wacha, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet

[1] AdE – Akademio de Esperanto

Sur la titolpaĝo: Mireille Grosjean, la nova Honora Membro de ILEI (vd. p. 18)

Sur la dorskovrilo: Interlingvistikaj Studoj de la Adam-Mickiewicz-Universitato (vd. p. 4)

Enkonduko

Karaj legantoj,

Feliĉe estis tre fruktodona la Komitata Kunsido de ILEI en la 10a de decembro 2022. I.a., kiel videble surkovrile, meritoplena eksprezidanto de nia Ligo, s-ino Mirejo Grosjean aliĝis al la Honoraj Membroj de ILEI; koran gratulon al ŝi!

Vi povas legi en tiu ĉi numero ankaŭ pri kelkaj aliaj fruktoj de la Kunsido, kiel ekz. la aprobita Laborplano de ILEI (p.14) kaj la nova membro-administranto de ILEI (p.34). Kiel ĉiam, la protokolon de la Kunsido vi povas trovi en: *https://www.ilei.info/instancoj/komitato.php*.

Pri taksado de lingvonivelo, Alessandra Madella kaj pri dumlecionaj ekzemploj kaj ekzercoj Mirejo Grosjean, prezentas siajn spertojn kaj rekomendojn, same kiel Judith Meyer, kiu mem sukcese trapasis C2-KER-ekzamenon, kundividas siajn travivaĵojn kaj konsilojn preparigante por la ekzameno (p.22). Didier Janot prezentas siajn starpunktojn kaj opiniojn rilate al aktivado ĉe UNESKO (p.27).

Fine kaj tre grave, vi havas la okazon legi pri la 25-jara jubileo de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj en la Universitato Adam Mickiewicz kaj la 50-jariĝo de la esperantistiĝo de ĝia kerna koro, prof. Ilona Koutny (p.4). Tute ĝojige ĉi-okaze estas prezentataj la novaj magistraj studoj.

Kiel la redaktoro de la revuo, s-ro József Németh, sciigis min, ĉi-numere ni ne povis aperigi ĉiujn materialojn ricevitajn; elkoran pardonon al ĉiuj, kies kontribuoj transiros al la sekva numero de IPR.

Ahmad Reza MAMDUHI

Novaj magistraj studoj por festi la 25-jariĝon de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj

Intervjuo kun Ilona KOUTNY

IPR: De tempo-al-tempo ni povas legi pri la progreso de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj de la Adam-Mickiewicz-Universitato en Poznano (Pollando). Nun ĝi jubileas sian 25-jariĝon. Ĉu vi, kiel iniciatinto kaj gvidanto de la studoj, povus koncize resumi tiun kvaronjarcenton?

IK: La tri-jaraj internaciaj studoj en Esperanto – unikaj en sia ĝenro – ofertas studobjektojn de **interlingvistiko en vasta senco**: internacian kaj interkulturan komunikadon, internaciajn etnajn kaj planitajn lingvojn (interlingvistiko en malvasta senco), koncentriĝas al la plej vaste uzata planlingvo Esperanto, pri ĝiaj lingvistika analizo, literaturo, movadhistorio kaj kulturo. Por doni bonan bazon por esperantologio ankaŭ lingvistikaj studobjektoj estas parto de la studprogramo. Tiel interesiĝantoj kun plej diversaj bazaj universitataj diplomoj kaj el diversaj mondopartoj povas partopreni en la studoj.

La specialiĝoj en la tria jaro ebligas enprofundiĝon en diversajn terenojn, el kiuj tre gravas la *instruista trejnado*, ja estas la sola universitata formado de E-instruistoj. Por tio IS de AMU kunlaboras kun ILEI kaj Edukado.net. Eblas aliĝi nur al tiu ĉi speciala jaro. La sekva ebleco estos en septembro 2023. La specialiĝo *internacia kaj interkultura komunikado* estas grava por montri la rolon de E-o en tiu ĉi tereno.

Nun studas la oka grupo: 21 partoprenantoj el 11 landoj, inter ili ankaŭ Azianoj (Ĉinio, Indonezio, Koreio kaj Vjetnamio) krom Eŭropanoj (Ĉeĥio, Francio, Granda-Britio, Kroatio, Pollando, Rumanio) kaj Sud-Amerikanoj (Brazilanoj). Entute preskaŭ 200 homoj komencis studi ekde 1998 el kiuj ĉ. unu triono finas la postulemajn studojn. Inter ili estas entuziasmaj junuloj kaj spertaj maturaj homoj, kiuj bone kompletigas unu la alian. La antaŭaj grupoj renkontiĝis unufoje ĉiusemestre, sed la nuna tekniko ebligas retajn renkontiĝojn, pli multajn kaj kun invititaj gastprelegantoj.

La **internaciecon** de la studoj certigas ankaŭ la instruistaro de IS. Estas grave doni eblecon al niaj konataj fakuloj (kiel John Wells, Humphrey Tonkin, Nicolau Dols … Vera Barandovska-Frank, Sabine Fiedler, Katalin Kováts) por gvidi kurson al la studentoj, ke tiuj havu freŝajn kaj aŭtentajn informojn pri diversaj terenoj de esperantologio/interlingvistiko.

IPR: Krom la ŝanĝoj por la aktuala postdiploma grupo okazis grava novaĵo: la startigo de magistraj studoj pri interlingvistiko en AMU. En kio ĝi estas speciala?

IK: El pluraj aspektoj la novaj **magistraj studoj** (specialiĝo kadre de la studdirekto lingvistiko kaj informmastrumado) diferencas de la post-diplomaj: ili daŭras du jarojn kaj surloke en Poznano, fine ili donas magistran titolon, sed ili same valoras 120 poentojn. Ili estas destinitaj unuavice por junuloj, kiuj volas magistriĝi. Alia grava afero estas la kombino de **interlingvistiko** (kies studobjektoj lingvistike estas orientitaj – en Esperanto) kun **informmastrumado** (kiel trovi kaj uzi lingvajn informojn el la reto – en la angla). La studentoj analizas lingvistikajn kategoriojn tra la Esperanta gramatiko, studas lingvotipologion, lingvopolitikon kaj interkulturan komunikadon. Kursoj pri Esperantaj literaturo, kulturo kaj movado lokas Esperanton en la mondan fluon. Lingvokursoj de Esperanto kaj la angla gvidas la studentojn al la plej alta nivelo, enprogramas ankaŭ kurso pri tradukado inter la du lingvoj.

La unua grupo startis en 2022 kun 10 ĉinaj studentoj, kiuj entuziasme kaj diligente laboras. Plejparto venas de la ĉina universitato Zaozhuang, kie ili studis Esperanton inter 2018 kaj 2022. La vicrektoro de AMU prof. Rafał Witkowski dekomence subtenis la novan projekton kaj akceptis la studentojn en la rektora salono kun donacoj [*vd. la foton sube*].



La studoj pretigas la studentojn ankaŭ por la ***labormerkato.*** Ja en internacia Esperanto-medio ili lernas kiel kunlabori en internacia grupo, alproprigas informadikajn metodojn kaj lernas lingvojn.

Por la sekva jaro 2023/24 ni atendas studentojn el diversaj landoj. Informoj pri tio alireblas en: https://kml.amu.edu.pl/en/interlinguistics/ kaj http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/blog.html#magistraj22

IPR: Ni aŭdis, ke aperis nova libro pri Esperanta kulturo en la serio de la Interlingvistikaj Studoj. Granda entrepreno, ĉu ne?

IK: Mi jam delonge planas eldoni **lernolibroserion por la Interlingvistikaj Studoj**, tio nun eĉ pli urĝas pro la tagaj studoj kaj ankaŭ la 25-jaraj spertoj devigas nin. La unua estis la lernolibro pri **Interlingvistiko** de Vera Barandovska-Frank en 2020, kiu dekomence gvidas la interlingvistikan kurson (planlingvistikon) kadre de la studoj, kun kontribuo de studentoj.

La nuna libro **Esperanta kulturo** (2022. red. Ilona Koutny. Poznań: Rys. p. 266) estas ĉapitraro verkita de instruistoj kaj studentoj de la Studoj. Post mia enkonduka artikolo pri Esperanta kulturo (trarigardo de la ĉiutaga kulturo ĝis arto, de ĝia lingva apero ĝis la socia engaĝiĝo kaj valoroj) ĝi gvidas la leganton tra la rilato inter kulturo, lingvo kaj lingvokomunumo per kontribuoj de Sabine Fiedler, Fabio Fortes, Ilona Koutny, Aleksandro Melnikov kaj Ida Stria.

Poste sekvas la prezento de diversaj kulturterenoj, komence kun diskutiga artikolo, ĉu Esperanto bezonas arton (Svorad Zavarský): pri teatro (François Lo Jacomo), gazetaro (Jukka Pietiläinen), Esperanto-radio (Barbara Pietrzak), televido (Miĥaelo Balicki), kino (Judit Schiller), Esperanto-muzeo en Zaozhuang (LI Xin) kaj scienco (José Antonio Vergara).

IPR: Vi parolis pri la jubileo de la Interlingvistikaj Studoj, sed ankaŭ vi jubileas persone, ĉu ne?

IK: Jes, mi esperantistiĝis antaŭ **50 jaroj,** kiam mi ekstudis Esperanton (1972) en la Budapeŝta Eötvös-Universitato (ELTE) ĉe prof. István Szerdahelyi. Kaptis min la fleksebla strukturo de la lingvo, ĝia justa solvo de internacia komunikado, la ebleco science kunlabori kaj la bona etoso en la Esperanto-fako. Post jardeko da spertado en eldonado (ankaŭ ĉe la tiama Scienca Eldona Centro de UEA) kaj komputa lingvistiko (ekz. ĉe la Budapeŝta Teknika Universitato) mi iĝis lia posteulo post lia morto en 1987. La unuan internacian magistran studadon pri esperantologio ni fondis en

ELTE… Do sume mi dediĉis jam 10+25=35 jarojn al la universitata instruado de Esperanto.

IPR: Dankon pro la intervjuo kaj ni deziras al vi eĉ pli grandajn sukcesojn!

Pli detale pri la studoj kun bibliografio:
https://esfconnected.org/2021/07/09/interlingvistikaj-studoj/
Nova intervjuo pri tiu ĉi temo aperis en la pola retradio: https://pola-retradio.org/2023/01/e_elsendo-el-la-25-01-2023/.

Enkonduko de la novelo „Antimilitisto” de Lusin



Por la komuna legado dum la Internacia Tago de la Esperanta Libro 2022 kaj por festi la naskiĝtagon de Zamenhof la 15-an de decembro, ILEI proponis interalie la komunan legadon de la novelo „Antimilitisto” de la fama ĉina verkisto Lusin (Lu Xun). Estis la dua fojo, ke ILEI proponis verkon de ĉina verkisto por tiu ĉi monda evento. Kaj por la unua fojo temis pri verko tradukita de nacia lingvo al Esperanto. S-ino Yu Jianchao, komitatanino de la ĉina sekcio de ILEI kaj prezidantino de la Pekina Esperanto-Asocio, verkis la suban enkondukon por tiu ĉi okazo.

Lusin estas la plumnomo de sinjoro ZHOU Shuren (1881.09.25–1936.10.19), unu el la plej elstaraj ĉinaj verkistoj de la dudeka jarcento kaj la fondinto de la ĉina moderna vulgara ĝenro.

La verko de Lusin profunde influis la Movadon de la Kvara de Majo (1919), kiam Ĉinio transformiĝis literature kaj politike. Lusin estis ankaŭ fama tradukisto, kiu konigis la mondan literaturon al Ĉinio.

En 1963, Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) eldonis Plenan Kolekton de Lusin: NOVELOJ DE LUSIN. En la libro estas la novelo **Antimilitisto**, bazita sur la klasikaĵo de Mozio.

Mozio (470–371 a.K) estis la ĉefa proponanto de filozofia skolo nomita laŭ lia nomo, Mohismo, Moismo aŭ Moziismo, kies ĉefa penso havas apartajn ecojn. Interalie, la tezoj „Homamo" kaj „Neatako" estas simple kompreneblaj kaj vaste akceptataj de miloj da jaroj.

Laŭ la penso „Neatako" de Mozio, milito mortigas kaj homo bezonas amon. Pro tio li kontraŭas agresmiliton. Lusin verkis en 1934 la novelon, kiun ni esperantistoj legas kun la titolo „**Antimilitisto**." En la Plena Kolekto ĝi troviĝas en parto de „Malnovaj Legendoj Nove Redaktitaj."

La aŭtoro esprimis sian malaprobon al la tiama socia maljusteco, rakontante la historion, ke siatempe Mozio vagadis inter kelkaj landoj por persvadi la reĝon de la potenca Ĉu-regno ne ataki la malgrandan Song-regnon. Li sukcesis en tiu persvado. Lusin en sia verkado elstarigis la opinion kontraŭ agresa milito kaj pledas por sindefendo de malgranda regno.

Oni opinias, ke **Antimilitisto** de Lusin estas la novelo kun la plej multaj verboj – por disvolvi la intrigon – de la monda literaturo. La ĉefa figuro Mozio ekaperas per sia hasta agado kaj ne ripozas eĉ onon da momento laŭlonge de la rakontado. En konstanta agado esprimata de unu verbo post alia, la agadisto Mozio ekstaras kaj ĉiam alkuras survoje por bremsi militon. Li sin ĵetas en la maljustan mondon de ĉikanado kaj perforta altrudado kaj streĉite okupiĝas por malhelpi sovaĝan kruelon, malmultigi vundojn inter militontaj regnoj, evitigi la disiĝon de familioj dum la milito.

Laŭ Lusin, Mozio reprezentas figuron meritnomatan kiel la „Nacia Spino." Sed li estis malbone traktita post kiam li sukcesis preventi la militon. Revenante hejme, survoje tra la lando de Song-regno, li estis traserĉita dufoje kaj, alproksimiĝante al la ĉefurbo, li devigite oferis sian spartecan pakaĵon al kolektantoj de landsavaj donacoj, eĉ estis forpelita tra la urbopordego, sub kiu li ŝirmis sin kiam pluvis…..

La lingvaĵo de la novelo ĝenre montras la bazan stilon de Lusin: lakona, solida kaj pensiga.

Plena Kolekto de Lusin estas tradukita de ĉinaj veteranaj esperantistoj, S.J. Zee, Venlo Fan kaj Tikos ktp. Provlegis ĝin tiam elstaraj aŭtoroj Hilda Dresen (Estonio), Teo JUNG (Germanio) kaj G. J. Degenkamp (Nederlando). La novelo proponita literature igas la legosperton plezura.

La eduksistemo en Kebekio

Intervjuo kun Zdravka METZ

Nia amikino Zdravka Metz afable respondis al niaj demandoj.
LO: Luigia OBERRAUCH
ZM: Zdravka METZ

LO: Saluton! Estas tre interese povi legi la rakonton pri via laboro.

ZM: Dankon. Jes, mia laboro estis kadre de *Colectif des femmes immigrantes du Québec* (Centro por enmigrintaj virinoj de Kebekio). Mi laboris de 1995 ĝis 2015, donante informprelegojn al grupo de enmigrintoj, kiuj finlernis la francan lingvon. Mia temo estis la lerneja sistemo en Kebekio.

LO: Ĉu vi povas rakonti al ni pri la historio de edukado en Kanado?

ZM: Ne, ĉar mi scias nur pri Kebekio – Kanado estas grandega lando (tiom granda kiel Eŭropo).
La historio de la unua lernejo en Kebekio datiĝas de 1658, kiam monaĥino Marguerite Bourgeoys fondis la unuan malgrandan lernejon en Montrealo, en Kebekio, laŭ la franca modelo de lernejoj.
La unua civila Ministerio de edukado en Kebekio estis organizita en 1964, post grandaj sociaj reformoj en la 60-aj jaroj de la 20-a jarcento.

LO: Kiel vi enkondukas enmigrantojn en la lernejan sistemon de Kebekio?

ZM: Mi informas, ke ekzistas privataj lernejoj, sed mi parolas nur pri publikaj lernejoj.
La **infano** – eĉ tiu, kiu venas de Francio aŭ alia franclingva lando – eniras tamen specialan klason por infanoj enmigrintaj, por ke li/ŝi iom adaptiĝu, ĉar ne ĉiam estas facile por infano forlasi siajn geavojn, gekuzojn, samklasanojn kaj amikojn. Tial ekzistas „*classe d'accueille*" (klaso bonveniga) por enmigrintaj infanoj organizitaj de la *Ministerio de Enmigrado*. Ĝi helpas, por ke enmigrinta infano, iom post iom, adaptiĝu kaj ne estu tro malgaja pro la forlaso de sia lando, ĉar foriri kaj enmigri, ja, okazas ĉefe laŭ decido de la gepatroj.

Se iu infano konas – aŭ komprenas – la francan, li/ŝirapide eniros lernejon organizitan de la *Ministerio de edukado*. Li/ŝi devas montri, ke li/ŝi komprenas la nivelon de matematiko aŭ de la angla lingvo, ĉar oni lernas la anglan kiel la fremdan lingvon de la unua klaso de bazlernejo.

Se enmigrinta **plenkreskulo** deziras studi, li/ŝi devas unue studi la francan por kompreni kaj sekvi la prelegojn pri diversaj temoj, kiujn oni traktas dum tiu plurmonata franca kurso. Poste li/ŝi bezonas la tradukon de sia diplomo (se li/ŝi posedas ĝin). La **Ministerio pri Edukado** komparos la finitajn kursojn de ties profesio en ies lando kun la kursoj de ĉi tie, por la sama profesio. Sekve, la Ministerio preparos la egalvaloran (ekvivalentan) diplomon. Se la faritaj studoj estis egalaj por iu profesio en iu lando kaj Kebekio, la Ministerio akceptos la profesion.

Kelkaj profesiuloj, kiel ekzemple kuracistoj, farmakologoj, … devas viziti apartajn kursojn por eklerni la uzon de medikamentoj kaj la manieron trakti malsanulon ktp. Advokatoj, kompreneble, devas studi ĉiujn leĝojn, kiuj validas en Kebekio kaj Kanado.

LO: Kiuj estis la lernantoj kaj pri kio ili kutime demandis vin?

ZM: Enmigrintoj, kiuj aŭskultis mian prelegon, devis jam kompreni la francan. Mi rakontis al ili pere de simplaj vortoj, parolante ne rapide kaj foje resumante la plej gravajn informojn.

Fakte, kiam mi venis en Kebekion, antaŭ 40 jaroj, mi ne parolis la francan kaj estis mi, kiu unue sekvis tiun bazan francan kurson. La inform-prelegojn kaj ĉiujn informojn preparas profesiuloj pri enmigrado. La prelegon pri la kebekia lerneja sistemo mi spertis ankaŭ kun miaj du infanoj. Do, parolante al enmigrantoj, mi jam bone sciis, pri kio atentigi ilin. Tial ili demandis min eble nur kiam mi donis adreson kaj ili ne sciis, kie troviĝas tiu adreso en Montrealo. Nun ĉiuj havas poŝtelefonon kaj oni facile trovas la lokojn en la urbo aŭ kontaktas lernejon.

Se temis pri **junaj memstaraj enmigrintoj,** kiuj aĝis **pli ol 18 jarojn** kaj venis sen la gepatroj, mi demandis pri la diplomo(j), kiu(j)n ili jam havis aŭ ne havis, kaj mi donis adreson por fari la egaligon de la diplomoj. La *Eduka Ministerio* volas scii, ĉu la junulo finis elementan aŭ mezgradan lernejon aŭ finstudis en iu profesia lernejo aŭ universitato, ĉu li/ŝi laboris, kaj se jes, en kiu profesio.

Kiam venis enmigrintoj sen diplomo aŭ ne kunportis aŭ ne povis ekhavi ĝin, ili trapasis testojn kaj ekzamenojn ĉi tie. Ili ricevas diplomojn de Kebekio laŭ la rezultoj de la faritaj ekzamenoj en Kebekio kaj ili povos tamen daŭrigi la lernadon/instruadon, eĉ la bazan – se ili pro viv-cirkonstancoj ne havas tion. Do, ili povos kompletigi konojn (sciojn) por la poste elektota studado.

LO: Ĉu vi povas priskribi al ni la lernejan dividon laŭ jaroj kaj aĝoj?

ZM: a) **4-jara** infano vizitas la *pré-maternel* t.e. la antaŭ-patrinan lernejon (ĝi similas al vartejo). Temas pri la klaso en regula lernejo kaj la infano restas tie nur duonan tagon (matene aŭ posttagmeze). Tie li/ŝi lernas bazajn regulojn de la lernejo. Ekzemple ke oni ne parolu samtempe, ke necesas levi la manon por rajti paroli …

b) **5-jara infano** vizitas la *maternel* t.e. la patrinan lernejon. En ĝi la infano komencas lerni la unuajn literojn, etajn poemojn, desegni, kanti. Ĝi estas nedeviga, sed utilas por societemiĝi. **Ĉiuj lernejoj havas tian patrinan lernejon.** Fine de la jaro la klasinstruistino priskribas nur la lertecojn kaj kapablojn de la infano.

c) **Elementa lernejo (deviga ekde 2022)**: de la 1-a ĝis la 6-a klaso (de la aĝo de **6 jaroj ĝis la aĝo de 12** jaroj). Tri-foje jare la klas-instruistinoj preparas „diplomon", aŭ „raportkarton", t.e. raporton pri progreso-sukceso de la infanoj. Post ricevo de ĉiu taksado nomata *bulteno*, la gepatro(j) individue renkontas la instruiston por aŭdi opinion pri la progreso de sia infano. Fine de la 3-a kaj 6-a klasoj en elementa lernejo, lernantoj havas skribajn ekzamenojn de la *Ministerio de Edukado* pri la franca, la angla kaj matematiko. (En tiuj tri ĉefaj kursoj, la infanoj devas sukcesi je pli ol 60%. Se ili ne sukcesas, ili ripetas la lerno-jaron).

ĉ) **Mezgrada lernejo de 5 jaroj** (de la 12-a ĝis la 17-a jaraĝo). Temas pri deviga baza instruado. **Elementa kaj mezgrada lernejoj estas devigaj kaj senpagaj.** Se lernanto ne havas intereson studi regule en mezgrada lernejo pro ne sufiĉa intereso je intelektaj kursoj kaj se li/ŝi deziras pli rapide komenci mane labori kaj rapide gajni monon, ekzistas eblecoj enskribiĝi por ricevi pli profesian diplomon:
DEP – **Diplomo de Edukado Profesia**, certa nombro de profesiaj kursoj por plumbisto, garaĝisto, veldisto.
ASP – **Atestilo de Specialiĝo Profesia** - malpli da horoj por lerni, sed multe pli da horoj por lerni praktike-laborante ol por DEP – por frizisto, vendisto, kelnero ktp.
DES – **Diplomo de Mezgrada Studado** (post 5 jaroj kaj **ĉiuj regulaj kursoj** de la 12-a ĝis la 17-a jaraĝo).
Tiuj, kiuj regule finis mezgradan lernejon, povas enskribiĝi en **CEGEP** (*Collège d'Enseignement Général Et Professionnel*), t.e. Ĝenerala kaj Profesia Kolegio. Por CEGEP oni pagas depende de la fako kaj nombro de enskribitaj kursoj.

Profesia kurso ĉe CEGEP, post 3-jara studado oni ricevos la diplomon **TEKNIKISTO** de…
Post **CEGEP – ĝenerala**, la studento povas enskribiĝi en **Universitato, kiu estas pagenda.**
En Montrealo estas **4 ĉefaj Universitatoj**: du franclingvaj: *Universitato Montreala* kaj *Universitato Kebekia en Montrealo UQAM* kaj du anglalingvaj: *Universitatoj McGill* kaj *Concordia*.
La plej **malnova franca universitato** estas **Laval en Kebeko (**la ĉefurbo**)**.
Ĉie tra Kebekio, en iom pli grandaj urboj, estas fonditaj publikaj Universitatoj ekde 1969: *Montrealo (UQAM); UQAC* (Chicutimi 1969) - *UQAT* (Abitibi et Témiscamingue 1969) - *UQAH* (Hull-1981) - *UQTR* (Trois-Rivières-1986) - *UQAR* (Rimouski 1973) kaj aliaj, kiuj havas iu(j)n Fakultato(j)n.

LO: Kiun rolon havas respektive la angla kaj la franca lingvoj en la edukado en la malsamaj partoj de la lando?

ZM: Kompreneble en Kebekio, kie la oficiala lingvo estas la franca, la franca lingvo estas oficiala ankaŭ por edukado. Ĉiuj kursoj estas en la franca, krom la angla lingvo - kiel angla kurso. En ĉiuj aliaj provincoj (anglalingvaj) la kursoj estas en la angla lingvo - kiel oficiala lingvo, krom en kelkaj ĉefe privataj francaj lernejoj, kiuj ekzistas. Sed denove, pri aliaj provincoj mi ne scias, ĉu iliaj lernejoj estas publikaj kaj senpagaj, aŭ ne.

LO: Kiun rolon havas la aliaj lingvoj de Kanado?

ZM: En Kanado mi ne scias, sed jes pri Montrealo. En Montrealo vivas pli ol 120 nacioj kaj tre ofte ili organizas la tiel nomatan **sabatan lernejon** ene de sia kultura aŭ religia centro. Kiam lernejoj ne funkcias, infanoj estas liberaj por aliaj liberaj aktivaĵoj. Ofte gepatroj kondukas infanojn por iu sporta, muzika aŭ lingva aktivaĵo.

Mi mem volontulis en sabata lernejo dum 12 jaroj, kiam mi volis, ke miaj infanoj plibonigu la kroatan lingvon kaj havu kontaktojn kun kroataj infanoj. Estas ege grave, ke, dum oni instruas iun nacian lingvon, la infano havu kontakton kun aliaj infanoj uzante la saman lingvon.

Laŭ mia scio nur la pola sabata lernejo (por infanoj de diplomatoj) uzas lernejan programon de Pollando kaj se familio reiros al la antaŭa hejmlando, infanoj integriĝos facile en normala lernejo. Estas profesiaj geinstruistoj, kiuj

gvidas la kursojn, ricevigas diplomojn kaj probable ilia lernejo estas subvenciata de Pollando, sed ilia pastro same estas pagata de Episkopejo.

Aliaj etnoj en sabato kunlaboras kun siaj volontuloj. Plejofte estas la gepatroj, kiuj gvidas kurson kaj instruas folklorajn dancojn kaj kantojn. Tre aktiva estas la ĉina komunumo, kiu eĉ prezentas kursojn de la lingvo ne nur al infanoj, sed ankaŭ al plenskreskuloj – ne nur al ĉinoj sed al ĉiuj, kiuj volas studi la ĉinan parole kaj skribe.

LO: Kiel faras la geinfanoj, kiuj ne estas anglalingvaj aŭ franclingvaj denaskuloj?

ZM: Denaskuloj en iu ajn nefranca lingvo en Kebekio unue lernas la francan lingvon. Kiam ili bone komprenas la francan lingvon (devigatan de Kebekio) kaj bone trapasas teston, ili eniras en regulan klason de la plej proksima lernejo, kie loĝas la infano. Post la unua baza franca kurso, la sama profesoro instruas al la infanoj matematikon kaj igas ilin eniri en regulan, normalan klason kun samaĝuloj naskitaj en Kebekio.

LO: Kiel la kanada socio valorigas kaj kreskigas la multlingvecon pere de edukado?

ZM: Pri tio zorgas la gepatroj, kiuj ja estas enmigrintoj. Ĉiuj volas uzi sian lingvon hejme kaj iras kun la infanoj al ties/sia preĝejo aŭ kultura centro. Dum la someraj ferioj, ofte la gepatroj vizitas sian landon kaj la infanoj praktikas sian kulturon vizitante geavojn, geonklojn en siaj unuaj landoj…

LO: Ĉu multlingvismo estas grava en ekzamenoj por iĝi instruistoj?

ZM: Tute ne! Multlingveco estas tute privata afero!

LO: Ĉu vi povas rakonti al ni kelkajn ekzemplojn pri edukado precipe per lingvoj?

ZM: Infanoj de enmigrintoj de iu ajn ne anglalingva lando devas esti enskribitaj nur en lernejo, kiu uzas la francan. Kompreneble la Kebekia provinco protektas la francan lingvon. Sen tiu/la leĝo 101, enmigrantoj/enmigrintoj eble elektus la anglan. Tio okazis antaŭe, sed oni rimarkis, ke la nombro de franc-parolantoj falas.

LO: Kiuj estas, laŭ vi, la perspektivoj de la instruado de Esperanto en kebekiaj lernejoj?

MZ: Esperanto jam estis instruita/instruiĝis ĉe universitata nivelo – kadre de lingvistiko. Belga universitata profesoro estis E-isto kaj kadre de lingvistiko E-o estis normala kurso en la 1970-aj kaj 80-aj jaroj ĉe la Universitato de Sherbrook. Tiam ekzistis ankaŭ forta loka E-a urba klubo. Kiam la profesoro emeritiĝis, ne plu estis sufiĉe da interesataj personoj kaj la Universitato de Sherbrook nuligis la kurson.

En 2007 ĉe UQAM estis instruita/instruata E-o, fondita E-klubo de la Universitato, ĉar en 2008 okazis TAKE- kongreso. Volontulo kaj profesoro de CEGEP instruis E-on kiel liberan aktivecon. Li helpis fondi la klubon, regule renkontiĝadis kun studentoj kaj ili partoprenis en TAKE, sed post la translokiĝo de la profesoro la studentoj ne havis internaciajn spertojn kaj oni fermis la klubon. Organizita klubo, kiu havas oficialan statuton kaj estas enskribita en la registro, devas havi aktivaĵojn. Se ĝi ne havas, ĝi malaperas. Se multaj personoj interesiĝas, ĉio eblas. Tamen neniu eduka institucio volas perdi la monon pro ne multnombraj enskribiĝoj.

LO: Kion vi opinias pri la neceso instrui Esperanton?

MZ: Esperanton instruis mia edzo kaj mi kadre de E-klubo en Montrealo, dum pluraj jaroj (1983-2000), sed bedaŭrinde la intereso ne estis granda, nur kelkaj kursanoj, 2-3-4 personoj, venis al nia kurso. Antaŭ la UK en Montrealo okazis tritaga, rapida kurso de K. Kovats. Ĝi estis tre sukcesa kurso, en kiu studis 75 personoj kaj ili povis plibonigi sian uzon de Esperanto. Tuj poste ili povis ĝui E-etoson, amikecon kaj belegan sperton. Ni organizis dum 30 jaroj diversajn lokajn kaj internaciajn E-semajnfinajn renkontiĝojn en Usono kaj Kanado kaj ĉiufoje venis 40-60 personoj. Multaj ĉeestis en la kongreso, sed multaj ne venis. Sed ni semas kaj semas ….

LO: Koran dankon pro la tempo, kiun vi dediĉis por la intervjuo!

Pri la laborplano de ILEI

Labor-plano kaj laboroj el la plano en la venontaj jaroj

En la lastaj monatoj la estraro de ILEI pretigis laborplanon, kaj tio estas io facila, kion eĉ estraroj kapablas fari [*vd. ĝin post tiu ĉi artikolo - NdlR*]. La komitato aprobis ĝin, kaj tio estas iom pli malfacila pro la bezono de multaj el la komitatanoj montri sian retorikan kapablon. Sed en la fino la komitato

aprobis ĝin. Nun realigi la laborplanon estas io malfacila, kion nur la membroj povas fari aŭ helpi fari kunlabore kun siaj sekciestroj kaj komitatanoj.
Certe sen la laboro de la sekcioj kaj de la membroj la plano valoras malpli ol la papero, sur kiu ĝi estis registrita. Pro tio estas bone, ke la membroj eksciu, kion ili devas realigi en la venontaj tri jaroj aldone al la normala rutina laboro pri instruado de Esperanto kaj kuntenado de la instruantaj esperantistoj.
Se vi rigardas la punktojn de la laborplano, vi povas konstati, ke la punktoj de 1 ĝis 7 estas administraj aŭ eldonaj de la tradiciaj revuoj, pri kiuj devos zorgi estraranoj kaj redaktoroj kun la helpo de kelkaj aparte alvokataj membroj.
La punkto 8 postulas kunmeton de komisiono, kiu redaktu la novan ekzamenan regularon, en mondo ĉiam pli reta. Sen tia komisiono la estrarano, al kiu oni donis la taskon, neniel povas sukcesi eĉ komenci la redaktadon. La postaj punktoj ĝis 16 verŝajne ne postulos apartan helpon de la membroj, krom de aparte petotaj koncernatoj.
Sed la postaj punktoj, kiujn mi kopias sube, ĉar temas pri veraj laboroj por la celoj de ILEI, realiĝos nur se la membroj kaj la sekcioj faros ilin siaj propraj amataj celoj:
17) „Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejano en la tuta mondo”: plenumigi almenaŭ 10 realigojn de la leciono por neesperantista klaso (niaj membroj)
18) „Esperanto-kursaro Tibor Sekelj rete”: starigi kursojn en almenaŭ 5 landoj/lingvoj, en kiuj nun ne okazas retaj kursoj de iu ajn tipo (Ahmad kaj Renato)
19) Instruado en publikaj lernejoj: realigi la iniciaton „30 Oraj Horoj” en Italio kaj bone dokumenti ĝin per libro, videoj, intervjuoj kaj artikoloj por faciligi imitadon (Laura, Bruĉjo, Alessandra)
20) Instruado en publikaj lernejoj: realigi iniciatojn similajn al la „30 Oraj Horoj” en almenaŭ tri landoj krom Italio (niaj membroj)
Se oni realigos ĉion ceteran kaj ne tion, tio pruvos, ke ILEI sukcesas vegeti sed ne vere vivi. Restas multaj aliaj punktoj, pri kiuj mi ne povas paroli nun, ĉar ĉi tiu artikolo jam iĝas tro longa, sed pri kiuj ni parolos en alia okazo.
Por nun tenu en la menso: **la laborplano povas esti realigata nur de la membroj**. Ahmad sola ne povas instrui Esperanton en Mongolujo kaj en Argentino, li ne povas peti lernejestrojn en viaj landoj permesi lecionon pri Esperanto, ktp. Li estas nur flago, kiun oni svingu por montri, kien oni iru, sed nenio plia.

Renato CORSETTI, volontula realiganto de la plano

Labor-plano de ILEI januaro 2023 - somero 2024

1) Restarigo de la administra sistemo de ILEI kaj prizorgado de la vivo de ILEI de la administra vidpunkto (Ahmad Mamduhi, Marija Jerković, Karine Arakeljan, Elena Nadikova, Hamzeh Shafiee, Renato Corsetti).
2) Renovigado de la retejo de ILEI (Alessandra Madella, Max Garcia, Cristina Bollini + estraro).
3) Dokumentado de la renovigado de la retejo de ILEI (Alessandra Madella, Cristina Bollini).
4) Kreado de la paĝoj pri IPR kaj JA en la retejo de ILEI (Jozefo Nemeth, Stano Marček, Cristina Bollini).
5) Regula prizorgado de la retejo de ILEI (Jozefo Nemeth).
6) Publikado de IPR (Jozefo Nemeth, Ahmad Mamduhi, Fernando Pita, Mirejo Grosjean, Alessandra Madella).
7) Publikigado de JA (Stano Marček, Elena Nadikova, Mirejo Grosjean).
8) Ekzamenoj de ILEI/UEA (Karine Arakeljan).
9) Komuna Legado okaze de la Tago de la Libro (15-a de decembro) (Alessandra Madella).
10) Dezirinda okazigado de plua eldono de Premio La Torre (Ahmad, Alessandra Madella, Renato Corsetti, Familio La Torre).
11) Realigado de libro pri Premio La Torre, se eble kun la ISBN-kodo de ILEI (Radojica Petrović, Renato Corsetti).
12) Publikigadi la librojn de la Aktoj de la ILEI-simpozioj 2020-1, se eble kun la ISBN-kodoj de ILEI (Fernando Pita).
13) Publikigi aliajn librojn pri ILEI kaj/aŭ edukado, se eble kun la ISBN-kodoj de ILEI (Fernando Pita, Alessandra Madella).
14) Daŭre verki trimonatajn raportojn (Elena Nadikova, Alessandra Madella)
15) Teni bonajn rilatojn kun UEA (Ahmad Mamduhi).
16) Teni bonajn rilatojn kun TEJO (Fernando Pita).
17) „Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejano en la tuta mondo”: plenumigi almenaŭ 10 realigojn de la leciono por neesperantista klaso (niaj membroj).
18) „Esperanto-kursaro Tibor Sekelj rete”: starigi kursojn en almenaŭ 5 landoj/lingvoj, en kiuj nun ne okazas retaj kursoj de iu ajn tipo (Ahmad Mamduhi, Renato Corsetti).
19) Instruado en publikaj lernejoj: realigi la iniciaton „30 Oraj Horoj” en Italio kaj bone dokumenti ĝin per libro, videoj, intervjuoj kaj artikoloj por faciligi imitadon (Laura Brazzabeni, Bruĉjo Casini, Alessandra Madella).
20) Instruado en publikaj lernejoj: realigi iniciatojn similajn al la „30 Oraj Horoj” en almenaŭ tri landoj krom Italio (niaj membroj).

21) ILEI-kongreso de Linjano (Laura Brazzabeni, Bruĉjo Casini, Fernando Pita, Karine Arakeljan, Alessandra Madella, LKK).

22) ILEI-simpozio de Linjano (Fernando Pita aŭ Alessandra Madella, depende de la elektita temo).

23) Sekva ILEI-kongreso (Laura Brazzabeni, Karine Arakeljan + aliaj depende de la elektita loko).

24) Daŭre okazigi ĉiumonatajn renkontiĝojn de universitatanoj (Ahmad Mamduhi, Renato Corsetti, Radojica Petrović, Fernando Pita).

25) Daŭre okazigi ILEI-forumojn (Radojica Petrović).

26) Instruista trejnado dum la kongreso ktp. (Radojica Petrović kaj Laura Brazzabeni).

27) Prizorgado de la jutuba kanalo de ILEI (Alessandra Madella, Aristophio Alves Filho, Mirejo Grosjean kun la helpo de Max Garcia).

28) Prizorgado de la aliaj retaj sociaj komunikiloj de ILEI (Didier Janot, Laura Brazzabeni kaj aliaj).

29) Daŭrigo kaj perfektigo de la „Homa Ĉeno." (Max Garcia, Alessandra Madella, membroj kaj ne-membroj).

30) Prezenti Esperanton al almenaŭ 3 NROj, precipe pri paco, ter-savado, lingvaj rajtoj kaj minoritatoj (Ahmad Mamduhi, Max Garcia, Didier Janot).

31) Batali kontraŭ analfabeteco per instruado de Esperanto almenaŭ en unu lando (Ahmad Mamduhi).

32) Sendi observantojn al UNESKO por videbligi niajn agadojn tie kaj klopodi akiri oficialan kunlaboran rilaton. Daŭre videbligi la projektojn jam plurlingve prezentitajn por la pasinta premio Hamdan (Kungfua Kunikleto, 30 Oraj Horoj, Edukado.net) (Alessandra Madella, Didier Janot, Max Garcia, Emmanuel Desbrières kaj aliaj).

33) Se eblas, partopreni en la venonta premio Hamdam pri edukado per taŭga kandidato (Alessandra Madella).

34) Pretigi varbadajn materialojn pri ILEI por UNESKO ktp. (Alessandra Madella, Max Garcia, Bruĉjo Casini, Didier Janot, Emmanuel Desbrières kaj aliaj).

35) Sendado de lernolibroj al Afriko (Renato Corsetti, Karine Arakeljan).

36) Pripenso pri evoluo de la kotiz-sistemo interalie por kovri la deficiton de la papera servo kaj por ke bazaj/retaj membroj ne pagu por papera servo, kiun ili ne bezonas (Didier Janot).

37) Pripenso de nova formato por IPR (reta/papera) por pli bone taŭgi laŭ la nunaj bezonoj (Didier Janot).

38) Pripenso pri la bezonoj de lernejaj instruistoj (membroj kaj ne(ankoraŭ)membroj); ĉu *Juna Amiko* sufiĉas?; kiaj servoj de ILEI helpus ilin? (Didier Janot).

Biografio de Mireille Grosjean, la nova Honora Membro de ILEI



Mireille Grosjean (naskita Mireille Robert), franclingva svisino, naskiĝis en 1946 en La Chaux-de-Fonds (Svislando) en tre malfermita familio, kie kunvenis homoj el la tuta mondo. Ŝi studis la francan, la germanan, geografion kaj historion en la universitato de Neuchâtel. En la jaro 1968 ŝi ekloĝis en la germanparola parto de Svislando kaj tie instruis la francan. En 1977 ŝi revenis al Romandio kaj komenciĝis por ŝi instruado de la germana, organizado de klasointerŝanĝoj kaj interkultura edukado. Ŝi mem oftege faris tiajn interŝanĝojn kun siaj gelernantoj, lertigis geinstruistojn pri tiuj spertoj same kiel lernejodirektorojn. Ŝi verkis pri tiu temo libron, kiu estas ilaro por fakuloj.

En 1982 ŝi komencis praktiki aikidon. Pro tio ŝi flugis al Japanio en 1985. Tie ŝi spertis mankohavan komunikadon per la angla. Reveninte al Svislando, ŝi vidis ekspozicion pri Esperanto kaj tuj eklernis la Internacian Lingvon.
Tuj ŝi havis en la svisa movado respondecojn, tio estas prezidanteco de la Kultura Centro Esperantista kaj la Gastejo Edmond Privat en La Chaux-de-Fonds. Tio daŭris de 1988 ĝis 1994. En 1998 ŝi fariĝis komitatano A por Svislando en la Komitato de UEA, tiu ofico daŭris ĝis 2013, poste ŝi reprezentis tie la Ligon (ILEI). Ŝi partoprenis en multaj UK-oj kaj reĝisoris kaj prezentis plurfoje la Internacian Artan Vesperon tie. Ŝi reprezentas UEA-n ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo. Mireille membris en la Internacia Ekzamena Komisiono de ILEI/UEA de 2006 ĝis 2022. Ŝi estas prezidanto de la Svisa Esperanto-Societo, ŝi estas membro de la Svisa ILEI-Sekcio kaj komitatano ĉe ILEI. En 2013 ŝi fariĝis prezidanto de ILEI kaj reelektiĝis en 2015 kaj en 2018 en tiu ofico. En 2020 ŝi anoncis, ke ŝi ne kandidatiĝos por la nova mandato en 2021.
Kunlabore kun la prezidanto de UMEA (medicinistoj) ŝi lanĉis la programon „aikideo” por prezenti Esperanton al aikidistoj kaj prezenti aikidon al esperantistoj. Pri tio vidu www.esperanto-aiki.de.

En la jaro 2006 Mirejo vidviniĝis; en la jaro 2008 ŝi emeritiĝis. Ŝi estas senbrutara nomado kaj vojaĝas tra la tuta mondo, ĉefe al Azio kaj Afriko. Ŝiaj multnombraj spertoj pri instruado ĝenerale kaj instruado de fremdaj lingvoj, same kiel ŝiaj grandaj konoj pri interkultura edukado kaj konflikto-solvado estas granda pluso por nia movado.

En 2014 Mirejo estis elektita kiel la ESPERANTISTO DE LA JARO 2014.
En 2015 kaj en 2018 Mirejo estis reelektita kiel ILEI-prezidanto.
En 2016 ŝi ricevis la Premion Deguĉi.
En 2019 ŝi estis elektita Honora Membro de Svisa Esperanto-Societo.
La 21-an de septembro 2015 (la 21-a de septembro estas la tutmonda Tago de Paco) edukado.net publikigis kursmaterialon de Mireille kun la titolo „KONFLIKTOSOLVADO".
En 2022 (novembre) ŝi estis elektita Honora Membro de ILEI. Ŝi sukcese trapasis la KER-ekzamenon je nivelo C2.
Vidu en *www.eo.wikipedia.org*.

Esperanto kaj la angla en la 8-a Internacia Konferenco de Azia Asocio por Lingva Taksado (AALA)

de Alessandra MADELLA (Italio)

La 8-a Internacia Konferenco de Azia Asocio por Lingva Taksado (AALA) okazis inter la 26-a kaj la 28-a de oktobro ĉe la Universitato Anna en Ĉenajo (Chennai), la iama Madraso, kiu estas la ĉefurbo de la plej suda barata ŝtato Tamilujo (Tamil Nadu). Bonŝance la organizantoj akceptis mian proponon de prezentado pri „La novaj ekzamenoj de la Itala Instituto de Esperanto: Testi kompetentojn kaj/aŭ kulturon" kaj, pro la daŭraj malfacilaĵoj vojaĝi pro Kovimo, mi povis partopreni interrete en la tute hibrida konferenco. Tiel mi rajtis havi duon-horon por paroli pri la lingvo de Zamenhof al internacia publiko de fakuloj pri testado. Mi klarigis la defiojn kaj la solvojn de la teamo (Laura Brazzabeni, Carlo Minnaja, Patrick Morando kaj Luigia Oberrauch), kiu laboras por reformuli la ekzamenojn de la Itala Instituto de Esperanto por alproksimigi ilin al la fokuso pri kompetentoj de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER). Parenteze, mi ankaŭ povis mencii la pioniran sukcesan lanĉon de la novaj ekzamenoj KER je nivelo C2 de Katalin Kováts kaj la daŭrigon de la registare-agnoskita faka instruado de Esperanto ĉe la Zaozhuang-Universitato en Ĉinio.

Samtempe mi havis la ŝancon ĝui la buntan kaj riĉan profesian konferencon, kiu havis kiel titolon „Klasĉambro-bazata taksado en kaj preter la nova normalo: Defioj kaj ebloj”. Ĝi estis majstre organizita surloke de Rama Mathew, emerita profesorino pri edukado de la Universitato de Delhio, kiu kapablis venigi mond-nivelajn spertulojn pri la testado de la angla, sed ankaŭ kuraĝe donis voĉon al junaj esploristoj kaj precipe al lokaj instruistinoj kaj lernejestrinoj. Krom aŭdi famulojn kiel Antony Kunnan de la Universitato de Makao, James Enos Purpura de la Universitato Kolumbio (Novjorko) aŭ Constance Leung de la *King’s College* (Londono) eblis, do, persone kompreni ion pri la ĉiutagaj problemoj kaj spertoj de la homoj, kiuj instruas la anglan en aziaj landoj, la nuntempe plej granda merkato por ties instruado. Tiuj front-liniaj instruistoj (kaj precipe instruistinoj) ofte kapablis turni la malfacilaĵojn de la pandemio en ŝancon konstrui pli fortajn sentajn ligojn kun siaj plurlingvaj gelernantoj kaj iliaj familioj, kiuj tradukiĝis al vido pri testado kiel ĉefe helpanta la lerno-procezon. Tiu ĉi konferenco donis al ili ankaŭ la eblon paroli kun siaj kolegoj, por trovi komunan solidarecon kontraŭ la kreskantaj premoj al uniformiĝo fare de la grandaj privataj instancoj de tutmonda angla-lingva instruado.

Inter la temoj pridiskutitaj ludis gravan rolon la neceso pli alte valorigi la lokajn lingvojn en la multlingva kunteksto de Barato. Ekzemple, Firdaus Shireen el la Angla kaj Fremdlingva Universitato de Hajderabado (Hyderabad) en la suda barata ŝtato Telengano esploris manierojn rete taksi la rakont-kapablojn de mez-lernejanoj parolantaj la tie malplimultan odian lingvon. Fakte, laŭ la nacia eduka politiko de 2020, infanoj rajtas lerni la sciencajn kaj sociajn fakojn kaj la anglan en sia propra denaska lingvo. Oni povus tiel serĉi pli multlingvajn manierojn instrui, kiuj valorigus la plurlingvan fonon de la gelernantoj. Sed, pro pluraj kialoj, oni ankoraŭ ne sukcesis plene ellabori kontentigajn manierojn taksi tiun daŭran translingvan kodŝanĝon. Ankaŭ la paralela taksado de la infanaj rakont-kapabloj en la angla kaj en la odia, do, montras la influon de la plej organizita instruado de la angla en lernejo, dum rakontoj en la odia lingvo, kiun la infanoj denaske parolas hejme, ŝajnas ankoraŭ sekvi fluon de konscio pli ol klaran strukturon, kun oftaj haltoj pro la malfacilo trovi la korespondajn vortojn. Oni vidas, do, malavantaĝon en la infanoj, kiuj ne rajtis lerni de la komenco en sia propra denaska lingvo. Tiu sento de la graveco uzi modernajn esplor-rimedojn por trovi manierojn pli multe valorigi la plurlingvan kuntekston de la gelernantoj respeguliĝas ankaŭ en la elekto de aŭtentaj tekstoj por la instruado de la angla. Ekzemple, Shoba K.N., profesorino de la angla ĉe la Universitato Anna, parolis pri sia sperto uzi la bildstrion *Verda Humuro* (*Green Humour*)

de la barata desegnisto Rohan Chakravarty, kiu sprite kunligas ekologion kaj kritikon kontraŭ la daŭra malapero de lokaj lingvoj.

Grandan simpation kaj eĉ indignon vekis la vortoj de Shrimathy Venkatalakshmi de la Angla Departemento de la Universitato Anna, kiu estas publika universitato kaj unu el la plej malnovaj inĝenieriaj institutoj en la mondo. Eĉ tie, se ĵus diplomita inĝeniero ne trovas laboron, oni tuj kulpigas la instruistojn de la angla, anstataŭ la fakajn. Fakte, la malpli protektataj instruistoj de la angla en privataj inĝenieriaj institutoj en barataj malgrandaj urboj aŭ en kamparaj areoj/terenoj tre ofte perdas sian laboron pro tiu ĉi kialo. Malgraŭ tio, preskaŭ ne ekzistas perfektigaj kursoj por subteni la instruistojn kaj samtempe la institucioj ofte fordonas gravajn horojn de instruado al apoj pretigitaj de grandaj privataj britaj firmaoj, kies klasĉambran individuan uzadon la barataj instruistoj devas nur pasive kontroli. Fortaj reagoj venis el la publiko de la konferenco kontraŭ tiu ĉi koloniigema tendenco, kiu kritike pensigas nin pri la efektiva rolo de la angla kiel „intergenta lingvo" mondskale kaj precipe en delonge liberiĝinta kolonio kun forta angla-lingva edukado kiel Barato. La demando klare estas, do, al kiu apartenas la angla en la nuntempa mondo.

Krom la barata kunteksto, la konferenco ankaŭ montris interesan super-rigardon pri diversaj aziaj landoj, kie la testado de la angla estas pli kaj pli influanta tiun de aliaj fakoj, estante siavice influata de ili. Ekzemple, Nakamura Keita de la japana Eiken-Fondaĵo parolis unuflanke pri la adopto de la KER-sistemo fare de la japana registaro en la universitat-eniraj ekzamenoj, sed ankaŭ pri la samtempa registara decido taksi logikajn kaj konajn kapablojn tra pluraj fakoj, inkluzive de la angla kaj de la japana. Nepras, do, por ekzamen-fakuloj iel trovi malfacilan ekvilibron tra tiuj du malsamaj celoj. Nguyen Thi Ngoc Quynh, la dua vic-prezidantino de la Azia Asocio por Lingvo-Taksado kaj la fonda direktorino de la Centro por Lingva Testado kaj Taksado de la Vjetnama Nacia Universitato en Hanojo, prezentis alian flankon de tiu ĉi tendenco al pli funda interplektiĝo inter la taksado de la angla kaj de la aliaj fakoj. Ĉar ekzameno ESL (Angla kiel Dua Lingvo) kostas nuntempe duon-monaton de mezuma vjetnama salajro, estis necese disvolvi vjetnaman normigitan teston de angla scipovo, validigita laŭ internacjaj normoj, danke ankaŭ al prezentado dum internaciaj fakaj konferencoj kaj la kreado de testo-banko. Sed tiu sperto pri internaciaj validigaj normoj, akirita de la disvolvintoj de la loka angla ekzameno, igis iliajn kompetentojn tre utilaj kaj deziratajn ankaŭ en la testado de aliaj fakoj, kiuj adoptis similan modelon.

Certe ankaŭ por esperantistoj estas tre grave pensi pri tiuj ĉi de-supraj kaj de-subaj tendencoj en la instruado de la angla, en loko demografie kaj ekonomie grava kiel la nuntempa Azio, por kompreni kiel plej bone proponi nian lingvon al internaciaj spertuloj pri lingvo-instruado kaj -taksado. En tiu ĉi senco, la partopreno en similaj konferencoj estas tre valora sperto, kiu espereble malfermos ankaŭ al ni novajn vojojn kaj aliancojn.

Kiel prepariĝi por KER-ekzameno

de Judith MEYER (Germanio)

NdlR: **Enkonduke al la artikolo de Judith Meyer, legu la resumon de Katalin Kováts pri la aktuala stato de KER-ekzameno[1]:**

Fine de novembro 2022 la KER-Ekzamena Centro de UEA okazigis denove Tutmondan Ekzamentagon. Historie ĝi estis la 10-a tia aranĝo kiam en la sama tago dise en la mondo samtempe eblis trapasi la KER-ekzamenojn ĉeeste – kaj ĉi-foje – en ĉiuj funkciantaj niveloj de la sistemo, t.e. ankaŭ je la nova nivelo C2, kiun eblis trapasi samtempe ankaŭ rete. En novembro ekzameniĝis entute 104 personoj kaj el inter ili sukcesis 91 kandidatoj (88%). C2-kandidatoj ekzameniĝis 31, el kiuj sukcesis 26 kandidatoj (84%). Kune kun la ĝisnunaj C2-kandidatoj estas entute 29 personoj, kiuj posedas atestilon pri sia C2-nivela lingvokono.

Geografie la 104 kandidatoj de la tutmonda ekzamentago venis el 18 landoj:

- *Azio*: Japanio, Sud-Koreio, Ĉinio, Vjetnamio;
- *Eŭropo*: Francio, Hispanio, Pollando, Svislando, Rusio, Kroatio, Nederlando, Germanio, Britio, Slovakio, Turkio;
- *Sud-Ameriko*: Meksiko, Brazilo, Kolombio.

Danke al la rapida kaj bona laboro de la administrantoj kaj kontrolantoj meze de decembro ĉiu ekzamenito ricevis sian rezulton kaj ĉiu sukcesinto la

[1] Fonto de la enkonduko: https://edukado.net/novajhoj?id=884

elŝuteblan PDF-atestilon. Libroforman atestilon eblos mendi (kontraŭ modesta sumo kaj sendokostoj) fine de januaro 2023
Dankegon al ĉiuj kunlaborintoj, sen kies helpo ne povintus okazi tia monda aranĝo.

Resume pri la ekzamenjaro 2022: estis eldonitaj entute 187 atestiloj, al kandidatoj el 35 landoj. Fine de 2022, post 13-jara funkciado ni havas 2650 KER-sukcesintojn. Gratulojn al ĉiuj ekzamenitoj kaj iliaj helpintoj (instruistoj kaj geonkloj de *Ekparolu!*) kaj koran dankon al la C2-teamo, al la sponsoroj, al la KER-laborgrupo de la Akademio de Esperanto kaj al la ekzamenintaj kolegoj.

La sekva eblo ekzameniĝi okazos RETE en tri semajnfinoj en junio, kaj ĉeeste dum UK en Torino. Vidu la koncernajn komunikaĵon kaj aliĝilojn ĉe: https://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj

Jen la artikolo de Judit MEYER pri la preparĝo[2]:

Mi ĵus trapasis la KER-ekzamenon je nivelo C2! Mi ege fieras kaj mi volas helpi al aliuloj fari same, do jen blogero kun nepolitika temo.

La kapablo starigi oficialajn (agnoskitajn de la Eŭropa Unio) KER-ekzamenojn estas grava sukceso por Esperantujo. Ĝi montras maturecon de niaj institucioj kaj pruvas la ekziston de homoj, kiuj atingis altegan nivelon en nia lingvo – nia lingvo ne estas nur „ludilo", kiun oni flankelasas, kiam la konversacio pasas al gravaj temoj, en nia lingvo okazas diskutoj pri sociaj temoj, literaturo kaj tiel plu. Kiam temas pri KER-ekzamenoj por aliaj lingvoj, multaj homoj decidas trapasi la ekzamenojn por akiri atestilon, kiun ili bezonas por laborposteno aŭ por eniro al universitata programo. Aliaj homoj decidas trapasi KER-ekzamenon por havi ian motivigan celon kaj limdaton por sia lernado. Certe esperantistoj ĉefe tial ekzameniĝas, sed ankaŭ ekzistas esperantistoj, kiuj ekzameniĝas pro la kialoj, kiujn mi menciis en la dua alineo, t. e. helpi al la varbado por Esperanto.

Ekzamenite mi povas rekomendi tion eĉ pro tria kialo: ĉar mirindas la sperto partopreni en tutmonda ekzamentago, kiam viaj kunuloj troviĝas en Meksiko, Japanio, Rusio, Kolombio, Francio, Koreio kaj tiel plu, kaj vi

[2] Fonto de la artikolo: https://komprenemo.wordpress.com/2022/12/15/kiel-preparigi-por-ker-ekzameno/

samtempe faras la saman aferon. Por mi, la decido trapasi la KER-ekzamenon je nivelo C2 estis ĉefe, ĉar mi malkontentis pri mia nivelo: mi ja flue babiladas pri ĉiutagaĵoj, sed mi ofte rimarkis, ke mankas al mi vortoj por temoj, kiujn mi malpli ofte diskutas en Esperanto, ekz. politiko. Do la ekzameno estis celo kaj limdato por mi kaj mi vere studis por ĝi – por tiu altigo de mia nivelo!

Jen kion mi faris:
Decidinte pri partopreno en la ekzameno, la unua tasko estas eltrovi kio mankas al vi. En mia kazo, mi certis, ke vortprovizo estas unu el la problemoj, do mi ekstudis ĉi tiun Anki-kartaron, kiu enhavas ĉiujn oficialajn radikojn de nia lingvo (la nomojn de plantospecoj ktp. mi tamen transsaltis).

Ĉiuokaze, lingvoekzamenoj (almenaŭ la KER-ekzamenoj por eŭropaj lingvoj) ne nur postulas bonan regadon de la vortprovizo kaj gramatiko, ili ankaŭ atendas, ke vi povu esprimi viajn opiniojn en pli kaj pli rafinita maniero pri pli kaj pli kompleksaj temoj. La KER-retejo enhavas informojn, kiuj temaroj atendas je kiu nivelo. Je la plej alta nivelo, certe vi povu verki publikigeblajn tekstojn pri sociaj problemoj kaj vi povu strukturate prelegi kaj debati pri tiaj temoj. Pri tio mi do komencis ekzerci min. Mi preskaŭ ĉiutage elektis iun hazardan temon, ekzerciĝis farante etan alparolon/ prelegon pri tio, kaj poste lernis la mankantajn esprimojn. Cetere mi ekstarigis ĉi tiun blogon por ekzerciĝi pri skriba produktado.

Kaj tradukado kaj kreiva verkado estas bonaj ekzercoj.
Tradukado de altnivela teksto kiel tiu de Yanis helpos al vi konstati, kiuj vortoj aŭ esprimoj mankas al vi – dum babilado aŭ kreiva verkado vi verŝajne anstataŭigus la mankantajn vortojn, sed dum tradukado vi devas lerni ilin. Tio kreskigos vin.

Mem-verkado de tekstoj helpos al vi formi opiniojn pri temoj, kiuj eble aperos en la ekzameno kaj post kelkaj provoj viaj tekstoj estos multe pli bone strukturitaj kaj verkitaj ol antaŭe. Certe la tago de la ekzameno ne estu la unua fojo, kiam vi verkos publikigeblan tekston pri socia problemo, ĉar tio fiaskus! Krom tio, helpas ankaŭ legado, por vidi kiel aliaj Esperantistoj verkas. Por la nivelo C2, oni atendas la kapablon adapti vian skribmanieron al la okazo, do helpas legi ne nur afiŝojn en Fejsbuko sed ankaŭ artikolojn en revuoj por ĝenerala publiko, sciencajn artikolojn, komentariojn, recenzojn, resumojn, formalajn leterojn kaj tiel plu, por povi imiti la stilon.

Eksciu vian nivelon kaj prepariĝu.
Post ĉirkaŭ duono de mia prepariĝotempo, mi decidis kontroli, ĉu mi trapasus la ekzamenon, kaj se ne, kial (por povi ekzerciĝi ĝuste pri tio). Mi do planis tempoblokon de 3,5 horoj, dum kiu mi povus seninterrompe fari la skriban provekzamenon, kiun Edukado.net afable havigas al la mondo. Mi solvis ĉion en kondiĉoj tute samaj al la reala ekzameno, do sen vortaro, sen helpo de interreto kaj tiel plu. Se vi ne estas studento kaj do ne kutimas ekzameniĝi, la provekzameno povas malkovri al vi solvendajn problemetojn rilate al tia longa ekzamenado:

- Kion manĝi kaj trinki dume (kaj antaŭe)
- Kiajn korpajn ekzercojn vi povus fari por plibonigi la cirkuladon de sango kaj oksigeno post longa sidado
- Kiel malplenigi vian menson, malstreĉiĝi kaj rekoncentriĝi inter la unuopaj taskoj
- Kalkuli kiom da tempo vi havos por ĉiu tasko/sekcio

Ankaŭ indas provi la aŭskultan provekzamenon. Dum la ekzameno, vi aŭskultos kaj respondos al demandoj pri du mallongaj sondosieroj de 5-10 minutoj kaj poste devos aŭskulti kaj verki resumon de 20-25 minuta prelego. Por tio bezonatas ne nur bona vortprovizo, sed ankaŭ memorkapablo kaj koncentriĝo, kiuj nur malfacile plibonigeblas. Tamen helpas ekzerciĝo – minimume vi tiel lernos kiel efike noti aferojn, tiel ke vi ne bezonos tiom teni en memoro.

Fine, ankaŭ zorge tralegu ĉiujn informojn pri la ekzameno, specife tion, kion vi alportu aŭ ne alportu, kaj planu esti tie longe antaŭ la komenco. Se vi (kiel mi) ekzameniĝas interrete, faru multajn teknikajn testojn kaj partoprenu en la preparsesioj, kiujn afable proponas Katalin. Se vi al la ekzameno alvenus hastegante kaj ankoraŭ pensante pri la problemoj, kiujn vi ĵus devis solvi, via menso ne estus en bona stato por trapasi la ekzamenon.

Konklude
Komence mi ne certis, ĉu mi faru la KER-ekzamenon, ĉar mi ne bezonas pruvi mian nivelon. Tamen nun mi tre ĝojas, ke mi faris ĝin, ĉar mia vortoprovizo kaj mia lingvonivelo multe pliboniĝis. Cetere la tuta sperto estis tiom pozitiva sperto de komunumo, kaj la ekzamenantoj de edukado.net (kaj de la Akademio de Esperanto) estis tiom afablaj kaj helpemaj, ke mi vere rekomendas la sperton al ĉiuj.

Instruisto havas la eblon decidi pri la enhavo de multaj ekzercoj

de Mireille GROSJEAN

Kompreneble, en publika lernejo, la instruisto ricevas lernolibron kaj devas uzi ĝin. Tamen okazas multaj momentoj dum la leciono, kiam la instruisto lanĉas klarigojn aŭ ekzercojn, kaj devas doni ekzemplon. Li aŭ ŝi povas prezenti la komparativon dirante: „Rusio estas pli granda ol Svislando", aŭ „Karlo estas pli inteligenta ol Julia", menciante lernantojn en la klaso. Ĉiuj komprenas, ke la dua ekzemplo ne taŭgas, ĉar ĝi difinas kapablon de precizaj lernantoj, tio estas insulto. Pli bone diri: „La gefiloj helpas la patron prepari manĝon" ol diri: „La patrino kuiras supon, dum la patro sidas antaŭ la televidilo". Tiu lasta frazo oftis en la lernolibroj, tamen nun venas nova vento: pro la fakto, ke edzinoj plej ofte laboras por finance subteni la familion same kiel faras la edzoj, la laboro en la domo (purigado, kuirado, prizorgado de la infanoj) devus esti same tasko por la edzo kiel por la edzino. Tio estas teorio, kaj ofte la praktiko foras… Se la instruisto proponas skemon: -o -as -on, li aŭ ŝi povas doni la unuajn frazojn kiel ekzemplojn: la bovino donas lakton – la najbaro helpas alian najbaron – la suno donas varmon. Kiam mi ankoraŭ instruis en publika lernejo, aperis en la uzendaj sonbendoj de la lingva laboratorio: Ruso trinkas vodkon – Germano trinkas bieron – Franco trinkas ruĝan vinon – Japano trinkas sakeon. Tio tre ĝenis min. Tio fortikigas stereotipojn, kaj tia efiko de instruado ne devas okazi, tio ne estas la rolo de la instruado. Male la enhavo de la instruado devas celi **respekton, solidarecon, toleremon**. Per ĉiuj vektoroj, laŭ ĉiuj vojoj. La instruisto havas tiun eblon preparante frazojn kun tiurilataj enhavoj. Tiel la pensmaniero de ĉiuj iom post iom evoluos.

Mi aŭdis de afrika instruisto, ke li uzis dum sia leciono jenan afrikan proverbon: „Por iri al virino, ne forgesu vipon!". Tio surprizis min, ŝokis min. Laŭ la instruisto tiu frazo devis esti temo por debato. Por debato mi preferus proponi aliajn afrikajn proverbojn: „Kiam elefantoj luktas, herbejo suferas" aŭ „Se vi instruas al viro, vi instruas al unu homo. Kiam vi instruas al virino, vi instruas al tuta vilaĝo" aŭ „Sidanta maljunulo vidas pli for ol staranta junulo."

Ni pensu pri la direktoro de Nelson Mandela, kiu aperis sur la kovrilpaĝo de IPR de la numero 2015/1 „La plej potenca armilo por plibonigi la mondon estas edukado". Do ni donu nian plej atentan rigardon kaj niajn plej grandajn klopodojn por krei trafajn ekzercojn kaj pli ĝenerale bonkvalitan instruadon.

La kapabloj de niaj gelernantoj montri respekton, solidarecon, toleremon, dependas de ni, tute same kiel de la edukado ricevita en la familio. Nian instrukapablon ni povas kreskigi legante Internacian Pedagogian Revuon!

Kiel agadi kun UNESKO?

UNESKO

La Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo (UNESKO), kies sidejo troviĝas en Parizo, konsistas el 193 membro-ŝtatoj, kiuj financas kaj gvidas la organizaĵon kaj ĝiajn agadojn. Ĉiun duan jaron, novembre de neparaj jaroj, la delegitoj de la membro-ŝtatoj kunvenas en la ĝenerala konferenco por decidi pri la gvidlinioj kaj voĉdoni decidojn, kiujn plenumos UNESKO.



Ne-Registaraj Organizoj (NRO) ĉe UNESKO

UNESKO kunlaboras kun Ne-Registaraj Organizoj, kiuj per kontrakto pretas

helpi al UNESKO atingi siajn celojn en unu aŭ pluraj el la statutaj agadkampoj. Je internacia nivelo UNESKO havas oficialajn rilatojn kun pli ol 300 NRO-oj, kiuj rajtas partopreni kiel observantoj en la ĝeneralaj konferencoj de UNESKO. Universala Esperanto-Asocio (UEA) estas unu el tiuj oficiale agnoskitaj NRO-oj ĉe UNESKO. ILEI ne ĝuas tiun statuson, sed estas ĝenerale invitata ĉeesti pro sia laboro en la kampo de edukado.

Ĉiun duan jaron, decembre de paraj jaroj, NRO-oj en oficialaj rilatoj kun UNESKO kunvenas en la Internacia Konferenco de la Ne-Registaraj Organizoj por organizi kunlaboron. UEA partoprenas kiel plenrajta membro kaj ILEI ĝenerale ĉeestas kiel observanto. Dum la konferenco la NRO-oj elektas ligan komitaton, kiu konsistas el prezidanto kaj 10 ceteraj membroj por kunordigi la laboron kaj la rilatojn kun UNESKO.

La lasta Internacia Konferenco de Ne-Registaraj Organizoj okazis la 14-15-16-an de decembro 2022 ĉe la sidejo de UNESKO en Parizo. La konferenco estis ankaŭ okazo por interrilati kun aliaj NRO-oj, kiuj agadas en la kampo de edukado, scienco kaj kulturo. La duan tagon de la konferenco okazis foireto en la sidejo de UNESKO, kie ĉiu organizaĵo havis la eblecon prezenti siajn projektojn al la aliaj partoprenantoj. UEA kaj ILEI havis komunan budon kaj prezentis siajn projektojn.

Agado kun UNESKO je landa nivelo

Krom la agado je internacia nivelo, en ĉiu lando ekzistas Landa Komisiono[3] de UNESKO starigita kaj funkciigata de la landa registaro. Ĉiu komisiono funkcias diversmaniere laŭ la lando, sed ĝenerale ankaŭ rilatas kun NRO-oj je landa nivelo. Landaj Esperanto-asocioj kaj ILEI-sekcioj estas en taŭga nivelo por rilati kun la UNESKO-komisiono de sia lando kaj organizi agadojn kun landaj filioj de NRO-oj en rilato kun UNESKO kaj/aŭ kun la landa komisiono.

Kion fari?

Ĉiu ILEI-membro estas invitita serĉi en la listo[4] de NRO-oj en rilatoj kun UNESKO tiujn, kiuj agadas en la lando, kun kiuj eblus organizi komunan agadon kaj fari proponon al sia ILEI-sekcio! Bonvolu atenti: la listo indikas la landon, kie troviĝas la internacia sidejo de la organizaĵoj (ekzemple

[3] https://fr.unesco.org/countries/commissions-nationales

[4] https://en.unesco.org/sites/default/files/list_ngos_official_partners_unesco.pdf

Nederlando por UEA), sed multaj agadas internacie kaj havas landajn filiojn aliloke. Estus tre bone, ke ĝis nia kongreso 2023 en Linjano Orsabla, ĉiu ILEI-sekcio kontaktu unu aŭ du NRO-ojn por pridiskuti eblan kunlaboron.

Didier JANOT

Ĉu vi volas subteni nepagipovajn samideanojn aliĝi al ILEI kaj/aŭ aboni la revuon JUNA AMIKO?
Ĉu vi volas helpi nepagipovajn samideanojn aliĝi al ILEI kaj ricevi nian fakan revuon IPR, la organon de la Ligo, tiel subtenante la starigon de fortaj kaj viglaj sekcioj? Ĉu vi ŝatus helpi nepagipovajn lernemulojn tra la mondo malkovri kaj ĝui la tre allogan kaj utilan revuon JUNA AMIKO, la „juvelon" de ILEI? Bonvolu sendi vian kontribuon al la koleghelpa kaso de ILEI pere de nia UEA-konto: ilek-a. Bonvolu klare skribi „subteno al ILEI-membriĝoj" kaj/aŭ „subteno al JA-abonoj" en la priskribo de la pago kaj bonvolu sendi atentigan mesaĝon pri ĝi al Karine Arakeljan, nia kasistino: ilei.kasisto@gmail.com. Se, kiam vi sendas al ILEI la monon, vi aldonas specifan nomon de homo, kiun vi volas helpi per ĝi, tio estos por ni granda helpo kaj ni gardos konfidencon.
Koran dankon pro via grava helpo!


La estraro de ILEI

El la landoj kaj sekcioj

Germanio

Memorlibro pri Franz-Georg Rössler, iama redakciano de IPR

Kun la titolo „Franz-Georg Rössler (1949–2017). Leben. Werk. Lebenswerk" (Vivo. Laboro. Vivlaboro), la eldonejo *Regionalkultur* publikigis germanlingvan libron, kiu enhavas artikolojn pri la diversaj aspektoj de la arta laboro de s-ro Rössler. La libro de Daniel Fromme kaj Rita Rössler-Buckel estas 180-paĝa, enhavas 150 bildojn, kaj aspektas vere bele. La aŭtoroj estas Eberhard Cherdron (teologo), Franz Dudenhöffer (kolego de Rössler ĉe la gimnazio), Rita Rössler-Buckel (edzino kaj delonga kunulino de Franz-Georg Rössler), Karl Buckel (frato de Rita



Rössler-Buckel kaj gimnazia instruisto en Ansbach) kaj d-ro Daniel Fromme (estro de la muzikkolekto en la Rejnlando-Palatinata Biblioteko).

Franz-Georg Rössler laboris dum multaj jaroj kiel instruisto pri muziko kaj geografio ĉe la Nikolaus-von-Weis-Gymnasium en Speyer. Tiu ĉi antologio prezentas lian ampleksan kulturan laboron: Rössler estis komponisto kaj muzikisto, verkisto kaj tradukisto, bildartisto kaj grafikisto, preleganto kaj esperantisto. La libro konsistas el ses grandaj ĉapitroj. La Lingvo Internacia aperas en ĉiuj ĉapitroj, ja Esperanto estis unu el la centraj karakterizaĵoj de lia vivo. Ĝi aperas en la biografia ĉapitro, kaj same en la ĉapitroj pri liaj muzika kaj belarta agado, en la ĉapitroj pri la ekspozicioj kaj literaturaj verkoj. La lastan, ampleksan ĉapitron verkis lia vidvino, Rita Rössler-Buckel, en kiu ŝi prezentas Franciskon kiel esperantiston (iom prezentante ankaŭ la lingvon mem, por ke la legantoj de la libro povu kompreni ankaŭ la fonon de ĉio ĉi). Franz-Georg Rössler lernis Esperanton en 1985, kiam li prunteprenis libreton de Richard Schulz el la ŝtata biblioteko en Mannheim. Fakte li ne volis lerni la lingvon, sed lin allogis la interna ideo kaj la strukturo de la lingvo. Li mem konfesis: „esperantisto mi estis fariĝinta, neintence, hazarde, tamen neeviteble." Do, li lernis la lingvon, kune kun la edzino, kaj feliĉe, en la sama jaro okazis en Germanio la UK, en kiu ili partoprenis kaj li spertis, ke la lingvo vere funkcias. Ekde tiam, dum ĉ. 30 jaroj, Esperanto apartenis al ilia vivo, kaj - mi povas aldoni - ili apartenis al la mondo de Esperanto. Por la dekjara Esperanto-jubileo li skribis en la libreto *Tempo tempesta,* ke li ankaŭ estontece ne povos forlasi Esperanton kaj li aldonis „Kiel heliko surdorsan dometon / Esperantujon mi portas kun mi". Li kune kun Rita partoprenis en Esperanto-renkontiĝoj, UK-oj, instruis Esperanton kaj muzikon, respondecis pri la muzika parto de la eventoj, helpis la komunumon de la katolika E-movado. Ili ofte kune muzikis: Fancisko ludis fortepianon kaj Rita fluton. Li ankaŭ direktis ĥorojn en la UK-oj kaj komponis Esperantlingvajn muzikaĵojn. Krom la muzika arto, la geedzoj havis ankaŭ ĵurnalistan agadon, ambaŭ estis membroj de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio. Francisko estis regula kunlaboranto ekz. de *Monato*, *Esperanto, Juna Amiko* kaj *IPR*. Li eldonis E-lingvajn librojn, tradukis verkojn kaj verkis originalajn poemojn.


En 1992, unu el miaj lernantinoj, gajnante la landan konkurson pri Esperanto, rajtis partopreni en la ILEI-Gimnazio en Bratislavo, kie la geedzoj Rössler instruis ŝin. Poste ili vizitis ŝin en Hungario kaj tiel ili ekkonis Hungarion kaj mi ekkonis ilin. Sekvis multjara kunlaborado, vizitoj, organizado de

ekspozicioj, eldonado de libroj, kunlaboro en redaktaj laboroj, do, sukcesa agado, kiun interrompis la neatendita forpaso de Francisko.
Fine, iom konsole, staru ĉi tie la salutvortoj de la iama urbestro de la urbo Speyer, Werner Schineller, legeblaj komence de la ĵus eldonita libro: „Franz-Georg Rössler estas unu el tiuj homoj, kiujn vi memoras".

József NÉMETH

Japanio

Anoj de la Saitama Esperanto-Societo en Japanio legis la novelon „Antimilitisto" de Lusin okaze de la komuna legado en la Tago de la Libro 2022. La elekto de la novelo estas ĝustatempa, ĉar tie kaj ĉi tie tra la mondo homoj militas. Ni sincere diskutis pri la filozofio de Mo-zi t.n. nemilitismo kaj pacifismo. Komuna legado donis al ni bonan okazon pensi pri homoj.
„Ne malvenki sen militi" estas nia konkludo. Nia kunsido okazis rete. Sur la ekranfoto nur mi mankis pro malfunkcio de mia kamerao!



ISIKAWA Tieko

Italio

La grupo „G. Canuto" de Parma en Italio festis la Zamenhofan Tagon en bela salono de monaĥejo dediĉita al sankta Johano la evangeliisto, kies preĝeja kupolo estis freskita de fama pentristo Correggio (elp.: Korreĝĝo). Ni estis gastoj de Pastro Gustavo Zanoli, prezidanto de nia E-grupo kaj benediktana monaĥo. Ni legis la poeziaĵon „L' Almozulo", ĉerpitan el la libro „La stranga butiko" de Raymond Schwartz laŭ invito de ILEI, kiu proponis ĝin por la komuna legado dum la Internacia Tago de la Esperanta Libro 2022. Ĉiu el ni legis strofon, dum oni faris videofilmeton, nun spekteblan en la jutuba kanalo „Esperanto + Edukado ILEI". Poste ni gustumis pladojn preparitajn de ni mem, klopodante ekspliki la receptojn Esperante. Fine ni tostis per dolĉa

blanka vino al la nova jaro kaj al la du gravaj kongresoj okazontaj en 2023 en Italio: la U.K. en Torino kaj la ILEI-Kongreso en Linjano Orsabla: malfacile elekti en kiu partopreni[5].



Cosetta BERNARDI, vic-prez. de la E-Grupo de Parmo

Serbio

Komuna legado en retkurso por komencintoj

La propono de ILEI por komuna legado okaze de la Tago de la Esperanta Libro estis akceptita por pliriĉigi la kurson A2 por komencintoj en Serbio. Ni elektis la versaĵon *Liriko kaj praktiko* de Raymond Schwartz el lia poemaro *La Stranga Butiko*. La spritaj versoj pri lirika ravo de floroj kreskantaj el larmoj de la poeto, kaj de birdokantoj sonantaj tra liaj sopiroj, kontraste al la pragmata komercista kompreno de la floroj kiel profitpromesa varo kaj de birdoj kiel apetitveka manĝaĵo, stimulis la kursanojn libere esprimi en la studata lingvo siajn observojn kaj komparojn de la du malsamaj perceptoj de la samaj aferoj – la spirita ĉe la poeto, kaj la materialisma ĉe la komercisto. Tiel, en gaja etoso, kelkaj novaj vortoj kaj parolturnoj, kaj grajneto de Esperanta kulturo, pliriĉigis iliajn lingvokonojn kaj esprimkapablon.

Radojica PETROVIĈ

[5] Redakcia noto: fakte eblas partopreni en ambaŭ, ĉar la UK-2023 okazos ekde la 29 jul.-5 aŭg. kaj la ILEI-Kongreso ekde la 5-12 aŭg.

Atestiloj kaj E-kultura programo en Beogrado

La Zamenhof-tagon kaj la Tagon de la Esperanta Libro ni festis ankaŭ en la ĉefurbo de Serbio. La 21-an de decembro 2022 je la 13-a horo Serbia Esperanto-Ligo okazigis aranĝon en Beogrado, en Biblioteko „Dr Milan Budimir". Tiuokaze estis enmanigitaj atestiloj al kursanoj kiuj la 2-an de novembro sukcese trapasis ekzamenon post la plurmonata, reta A-kurso de Esperanto. La kurson gvidis Nedeljka LOŽAJIĆ (Loĵajiĉ), prezidantino de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj), estrarano de Serbia E-Ligo (SEL) kaj membro de ILEI. Dum la programo estis prezentita nova libro de Zlatoje MARTINOV: „Istorija planskih jezika" – „Historio de planlingvoj", estis sciigitaj la rezultoj de la Literatura Konkurso kaj oni havis eblon aŭskulti poezion kaj kantojn en Esperanto.



La temo de la Literatura Konkurso estis traduki la poemon de la fama poetino Desanka MAKSIMOVIĆ „Sad sam mirna" („Nun mi estas trankvila") el la serba lingvo al Esperanto. Alvenis entute 5 konkursaĵoj. La ĉefan premion de 12 000 dinaroj – laŭ la decido de kvinmembra faka ĵurio – ricevis Zlatoje MARTINOV pro la plej bona traduko. E-libron kaj diplomon – laŭ la rezulto de reta voĉdonado de esperantistoj – ricevis Živanko NOVAKOV pro sia bonega traduko. Ĉiuj aliaj partoprenantoj ricevis E-libron.

La ĉeforganizanto de la evento estis Nedeljka LOŽAJIĆ. Al la programo kontribuis, interalie, Jovan ZARKOVIĆ – prezidanto de SEL (Serbia

Esperanto-Ligo), E-kursaninoj Danijela PETROVIĆ (piano, E-poemo) kaj Dragana DUČIĆ (E-poemo) kaj Miomirka KOVAČEVIĆ (E-poemo).
En la evento partoprenis dek ses personoj.

Aranka LASLO

Nova membro-administranto de ILEI



En la 10-a de decembro 2022 okazis Komitat-kunsido de ILEI, unu el kies tagorderoj estis „Elekto de la nova membro-administranto de ILEI (propono de la Estraro: inĝeniero Hamzeh Shafiee).” Dum la diskutoj pri tio, Alessandra Madella, vic-prezidanto de ILEI, i.a. klarigis, ke ekde 2013 ĝis la fino de 2022 por tio laboris Sebastian Cyprych. Ŝi kaj pluraj aliaj ĉeestantoj, i.a. Mireille Grosjean kaj Ahmad Mamduhi, dankis lin pro lia sindonema laborado dum la jaroj.
Post sufiĉe multaj paroloj kaj diskutoj pri tio, inĝ. Hamzeh Shafiee estis unuanime elektita kiel la nova membro-administranto de ILEI. Li i.a. estis la iniciatinto kaj ĉefmotoro de IrEK-oj (Iranaj Esperanto-Kongresoj) kaj delonge estas ĉefredaktoro de la tri-monata Esperanto-revuo de Irano, nomata „Irana Esperantisto” (ĉiuj ĝiaj numeroj ekde aŭgusto 2002 elŝuteblas libere el: https://www.espero.ir/eo/revuo-e/). Li de multaj jaroj estas prizorganto de IrEA-retejo, en kiu li i.a. estigis ampleksan paĝon por okazigo de VEKI-3 (https://www.espero.ir/eo/veki-3/), kie eblis aliĝi, vidi aliĝintojn kaj la programon kune kun biografietoj de la prelegantoj kaj la priskriboj de ĉiuj prelegoj. Nun, vi povas spekti registraĵon de ĉiu prelego per simpla klako sur ĝia titolo.
Jen lia biografieto, kiun li skribis responde al la peto de Ahmad Mamduhi:

„Mia nomo estas Hamzeh Shafiee (elp. Hamze Ŝafii), mi estas irana esperantisto kaj inĝeniero pri telekomunikado, kiu naskiĝis en 1966 en Naĝafabad, urbeto proksime al Esfahano, tamen ekde mia 2-jaraĝo, la tuta familio ekloĝis en Tehrano. Nun mi estas 56-jaraĝa emerito multtempe laboranta por Esperanto ĉu kadre de IrEA (Irana Esperanto-Asocio) ĉu kadre de IrLEI (irana sekcio de ILEI).

Mi lernis E-on aŭtodidakte en 1984 pere de mem-lernolibroj. Dek jarojn post tio, mi unuafoje vojaĝis eksterlanden, partoprenante en la 1994-a UK-o en

Koreio. Samtempe, mi partoprenis ankaŭ en ILEI-Konferenco tie kaj pasigis dum tio kelkajn kursojn kaj ekzamenojn. Mi gajnis atestilojn de la A- kaj B-Seminarioj por Eduko de Cseh-Metodaj Instruistoj de la Lingvo E-o kaj ankaŭ atestilon de La Elementa Ekzameno de ILEI/UEA. En la postaj jaroj, mi partoprenis en kelkaj aliaj kongresoj kaj gvidis kelkajn Esp-kursojn.
Dum mia profesia laboro, mi estis respondeculo pri inĝenierado kaj planado de inter-urbaj kaj internaciaj telefon-centraloj. Laŭ la progreso de teknologio, mi okupiĝis pri datum-centroj kaj datum-ekipaĵoj. Parto de mia laboro rilatis al manipulado de datumbazoj kaj utiligado de ili en mia profesio.

Kaj sube vi vidas mian koncizan biografion en kronologia ordo:
- 1966: La 28-an de aŭgusto mi naskiĝis en malgranda urbo Naĝafabad proksime al Esfahano.
- 1968: La tuta familio translokiĝis al Tehrano.
- 1984: Mi ricevis diplomon en elektrotekniko. En la sama jaro, mi sukcesis pasigi universitat-ekzamenon kaj eniris teknikan kolegion en Tehrano.
- 1987: Mi ricevis post-diplomon en elektroniko.
Dum someraj ferioj de 1975 ĝis 1984 mi laboris en multaj terenoj, plejmulte teknikaj.
- 1988: Mi sukcesis en universitataj enir-ekzamenoj por daŭrigi mian studadon pri elektroniko kaj samtempe mi sukcesis studi kurson pri la angla-traduko.
- 1988: Mi laboris en elektronika muntoĉeno kaj telefon-fabrika kompanio.
- 1989: Mi dungiĝis en la Telekomunika Kompanio de Irano kiel teknikisto.
- 1989~2019: Dum tridek jaroj, apud mia profesia vivo, mi trapasis multajn teknikajn kaj sciencajn kursojn pri telekomunikado, komputilo kaj la angla lingvo. Mi povis daŭrigi la studadon ĝis licencio en telekomuniko, kiam mi estis laboranta. Samtempe mi okupiĝis pri la Esperanto-movado en Irano.
- 2019: Mi emeritiĝis kaj ekde tiam povis dediĉi pli da tempo al la movado.”

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (*prez., dumtempe pluservanta ĝis la venonta elekto*)
Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Aristophio Alves Filho.
Kontrola: Simon Smits, Nvard Manveljan.
Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.
Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Gong Xiaofeng „Arko", Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Kristin Tytgat, Vicente Manzano-Arrondo, Radojica Petrović, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 15)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: *http://www.ikso.net/eo/.*

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: *redaktanto@edukado.net.*

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983. Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, *zsofia.korody@esperanto.de.*

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la retpaĝon de UEA.*

TEJO (http://www.tejo.org/): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Fernando Pita**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Albert Stalin Garrido.**

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, *www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Ahmad Reza Mamduhi.** Observanto de UEA ĉe ILEI: **Duncan Charters.**

LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj): prez. **Nedeljka Ložajić**, *nedeljkalozajic@gmail.com*.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE *(Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo)* Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**.

FIPLV *(Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj)*

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro.**

Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Alessandra Madella,** *a.madella@tiscali.it*, **Didier Janot,** *didier.janot@gmail.com,* **Emmanuel Desbrières** kaj **Maximiliano Garcia**.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 25 € en A-landoj kaj 12,50 € en B-landoj, kun ricevo de 4 paperaj kaj bitaj numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al la reta versio de IPR membreco kostas 12,50 € por la A-landoj kaj 6,25 € por la B-landoj. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan IPR kaj paperan *Juna Amiko* (JA). Tio kostas por A-landanoj 40 € kaj por B-landanoj 22,50 €. Abono de JA papera (kune kun la bita) kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA bita kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando. **Lando-kategorioj: B-landoj**: iamaj socialismaj landoj de Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj

Korea Resp.), Afriko, Ameriko (escepte de Usono kaj Kanado), Kiribati, Papuo-Nov-Gvineo, Solomonoj, Vanuatu en Oceanio. **A-landoj**: ĉiuj landoj escepte de tiuj de kategorio B. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al **Karine ARAKELJAN**, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, *ilei.kasisto@gmail.com*. Bv klare indiki la celon de via pago.
La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de via sekciestro aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:
a) Pagoj al la sekciestro alvenos al ILEI kune kun tiuj de la aliaj membroj de la sekcio. Vi jam estos en la sekcia listo kaj ne devos mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon.
b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Se vi ne mem posedas UEA-konton, por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Se vi ne estas en la sekcia listo, bonvolu mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon (aliĝilo: https://www.ilei.info/Aligxilo.pdf; abon-formularo por *Juna Amiko*: https://www.ilei.info/Juna_Amiko.pdf). Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al la ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 30 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.
* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub la numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).
* Retpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info*.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Torhoutsesteenweg 453/0003, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario, jozefo.nemeth@gmail.com*, tel*: (+36-70) 931-0530.* Peranto de ILEI kadre de LIBE: Olena Poshivana, *olenaposivana@gmail.com*.
Redaktora noto:* la ĝisnuna, limigita retejo de IPR (**https://www.ilei.info/ipr/) baldaŭ ĉesos funkcii. Anstataŭ ĝi ni kreis pli ampleksan arkivon ene de la retejo de ILEI. Ĝia aktuala adreso estas https://www.ilei.info/revuoj/ipr-arkivo.php.**
Ni fermis la nunan numeron la 15-an de januaro 2023,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de aprilo 2023.

SEKCIOJ DE ILEI

Albanio: Bardhyl SELIMI, Rruga Fortuzi, nd.9, h.1, ap. 3, AL-1016 Tirana, *bselimi@gmail.com*
Armenio: Lida ELBAKJAN, Moldovakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan, *lidaelb@yahoo.com*
Barato: Arikapalli Giridhar RAO, Azim Premji University, Survey No. 66, Burugunte Village, Bikkanahalli Main Road, Sarjapura, Bengaluru 562125, India, *rao.giridhar@apu.edu.in*
Belgio: Marc CUFFEZ, Torhoutsesteenweg 453/0003, BE-8400 Oostende, *flandrio@hotmail.be*
Brazilo: Aristophio Andrade ALVES FILHO, Rua B-55, N° 85, Conj. B. Bentes 1, Q. B-55, Benedito Bentes, Maceió, AL, Brasil, BR-57085-748, *esperantomaceio@yahoo.com.br*
Bulgario: Mariana EVLOGIEVA (komitatano), *ileibg@espereto.com*
Burundo: Gilbert NDIHOKUBWAYO, BP 7072 Buĵumburo, *gigi.kadi@gmail.com*
Ĉinio: WEI Yubin „Jado" Baiyangshujie Xiaoxue, Taiyuan Shanxi, CN-030003, *ilei_cxinio@163.com*
Danio: Pia WETTERGREN, Wettergren, Kastanjens Kvt 9 C, DK-2620 Albertslund, *frupiawettergren@gmail.com*
Francio: Didier JANOT, 3 rue Élisa Lemonnier, FR-75012 Paris, *didier.janot@gmail.com, https://eventaservo.org/o/ILEI-Francio*
Hungario: József NÉMETH, Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász, *jozefo.nemeth@gmail.com*
Germanio: Zsófia KÓRÓDY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, *zsofia.korody@esperanto.de*
Indonezio: Ilia Sumilfia DEWI, Perumahaan, Pejuang, Pratama, Blok L, no. 11, RT/RW 003/006, ID-Bekasi, Jawa Barat, *ilia.dewi@gmail.com*
Irano: Ahmad Reza MAMDUHI, Nr. 9 K. Iraj, Kh. Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-Afshar, Kh. Vahid Dastgerdi, IR-19166-13514 Tehran, *mamduhi@gmail.com*
Italio: Luigia OBERRAUCH MADELLA, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, *esperoenparmo2020@yahoo.com*
Japanio: ISIKAWA Tieko, Tate 2-4-4-304, JP-353-0006 Siki-si, Saitama-ken, *tiekosanjo_103@bj8.so-net.ne.jp*
Kongo DR: Kongo DR: Florent NTOTO, B.P. 1897 KINSHASA I, Kongo DR, *flontoto@gmail.com*
Korea Resp.: CHO Weonseok, *vivanta58@hanmail.net*
Kroatio/KEL: Marija JERKOVIĆ, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, *mjerkovic@net.hr*
Kroatio/KEU: Svijetlana AKIK, Franje Malnara 52, HR-10000 Zagreb, *ilei@hes-keu.hr*
Mongolio: Khorloo TSERENDEJID, MN- Ulaanbaatar bayangol district, khoroo 24, 42-1-62, *tserendjd@yahoo.com*
Nederlando: Robert MOERBEEK, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, *moerbeekr@gmail.com*
Pollando: Magdalena TATARA, ul. Grzegórzecka 74/4, PL-31-559 Kraków, *mtatara@gmail.com*
Rumanio: Mihai TRIFOI, Str. Principală, Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, *mihaitrifoi@yahoo.com*
Rusio: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, *lena_espero@mail.ru*
Senegalo: Lafi Charles DIATTA, BP 17935 Dakar-Liberté/Dakar, *lafi charlesd@gmail.com*
Serbio: Aranka LASLO, Imotska 34. RS-24000 Subotica, *laslo.az@gmail.com*

Svedio: Sten SVENONIUS, Vendelsfridsgatan 4 c, SE 21764 MALMÖ, *ilei-se@outlook.com*
Svislando: Mireille GROSJEAN (komitatano), *mirejo.mireille@gmail.com*
Tanzanio: Mulele Samwel MBASSA, Box 25, Bunda - Tanzanio. Poŝtel: +255786 819 767, +255758 176 722, *mulelembassa@gmail.com*
Togolando: KOFFI GBEGLO, 07 BP. 13169 Lome 07, Lomé- TOGO, *esp.togo@gmail.com*
Ukrainio: Nina DANYLYUK, pr. Sobornosti, 32, Log. 108 UA-43026 U. Lucjk, *nina_daniljuk@ukr.net*
Usono kaj Kanado: William B. HARRIS, 4 Edgecomb Ct, Portland ME 04013 USA, *wb_harris@hotmail.com*

REPREZENTANTOJ

Aŭstralio / Nov-Zelando: Penelope VOS, 50 Victoria St, Cooma, NSW, Australia, *penny@mondeto.com*
Britio: Renato CORSETTI, 22, St. Pancras Court, High Road, London N2 9AE, UK/Britujo, *renato.corsetti@gmx.com*
Finnlando: Sylvia HÄMÄLÄINEN, F.E. Sillanpään katu 2 C 46, FI-33230 Tampere, *sylvia.h@kolumbus.fi*
Ganao: Alfred Kobina ARTHUR, P.O. Box CT 7432, Cantonments, GH-Accra, *ctrcgh@gmail.com*
Hispanio: Luis Eduardo BERDOR REMON, Pablo Iglesias 41, 4 B, ES-50018 Zaragoza, *eduardo.berdor@gmail.com*
Pakistano: Adeel Mahmood BUTT, Ward No. 11, near M.C. High School, PK-39100 Nankana Sahib, *interlingvisto@gmail.com*
Slovenio: Peter GRBEC, Sv. Peter 142, SI-6333 Sv. Peter, *peter.grbec@gmail.com*
Tajvano: Reza KHEIRKHAH, Chung Ching Road, No. 105, TW-Pingtung city, 900-73, *rezamenhof@yahoo.com*
Vjetnamio: Hoan Thi TRAN, Xom 11 – Yen Loc – Kim Son, VN-430000 Ninh Bính, *hoantran37@gmail.com*

KONTAKTPERSONOJ

Aŭstrio: Walter KLAG, Vieno, *esperanto@chello.at*
Israelo: Luiza CAROL, str. Bnei Binyamin 53, apt 12, Netanya IL-4201997, *luizacarol1947@gmail.com*
Kostariko: Hugo MORA POLTRONIERI, Apartado 4981, CR-1000 San José, *tikoguau@gmail.com*
Litovio: Gražina OPULSKIENĖ, Obuoliuko 42, Mažeikiai LT-89312, *grazopul@yahoo.com*
Norvegio: Douglas DRAPER Esperanto, Olaf Schous vei 18, NO-0572 *Oslo, oficejo@esperanto.no*
Portugalio: Luna M. SILVA, *luna@esperanto.pt*
Uzbekio: Anatolij IONESOV, P.O. Box 76, UZ-140100 Samarkand, *imps86@yahoo.com*
Venezuelo: Asociación Venezolana de E-o, Jezer DORANTE, Apartado postal 47675, Caracas 1041-A, VE, *jezerdorante@gmail.com*
Zimbabvo: Benjamin Asende KABWE, Tongogara Post office. P.O. Box 228, Chipinge, Manicaland, Zimbabwe, *benjaminkas52@gmail.com*



